

Protokolo de la Komitato de ILEI en Kunmingo, sesio 2

Ĝi okazis en Salono Szerdahelyi, la 23-an de julio 2012, inter 08:15 kaj 12.20.

1. La rektoro de la Arta Kolegio de Kunmingo salutis kaj esprimis la deziron por daŭra kunlaboro inter la kolegio kaj ILEI.
2. La Nepala sekcio proponis sin kiel novan sekcion. Kondiĉo de la akcepto estus, ke la sekcio liveru sian statuton al la nova komisiito, same kiel ĉe la du pli frue akceptitaj sekcioj. Bharat Ghimire parolis pri tiu nepala sekcio. En la diskutoj LEE Jungkee diris, ke ĉiuj nepalaj esperantistoj kiuj instruas aŭ interesiĝas pri edukado devas havi la rajton aliĝi libere kaj ke la sekcio funkciu demokratie. Aurora Bute komentis similitone. Synnove Mynttinen (SM) diris, ke la principo devas esti egalkriteria por ĉiuj aliĝpetoj. Montriĝis, ke la membro-postulo ne estas en ordo, dum ĉe la akceptitaj sekcioj ĝi ja estis en ordo. Proponita, ke per reta korespondo la aliĝo de la Nepala sekcio estu traktata de la sekvonta estraro. Voĉdone akceptita.
3. La Strategia Vizio rilate al edukaj rimedoj - klara celo estas postulata por realigi la strategian vizion. – la rolo de ILEI estas centra kaj kerna parto de la vizio. Mirejo Grosjean (MG): informado estas grava por tiuj, kiuj ne konas Esperanton. Informado estu sekvata per instruado. <edukado.net> kaj <lernu.net> funkcias grave. SM: devas esti kompetenta kaj perfekta instruisto.
4. Instruista trejnado : Stefan MacGill (SMG) akcentis, ke ni kolektu la iniciatojn, kiuj estas plenumataj de agantoj individue aŭ tra aliaj organizaj strukturoj kaj rekaptu tiujn strebojn sub unu fleksebla tegmento cele al agnoskigo, ekzemple ĉe ALTE. Reta kaj fizika trejnado (kiel en Poznano, tra <edukado.net>, kaj nun ĉe ILEI) devas okazi paralele. Klariga dokumento ekzistas.
5. Financa peto al UEA por 2013 : SMG klarigis la financpeton de ILEI al UEA. MG klarigis pri afrika financa subteno fare de la fondaĵo Hans el Nederlando. Veturkoston ŝi mem pagis. Ŝi akcentas, ke devas esti pluraj personoj, kiuj daŭre kontribuos por la afrika movado kadre de ILEI. Komitatanoj ricevis la detalan peto-tekston, UEA indikis, ke ĝi estas plenumbla sen la interveno de la Komitato de UEA.
6. La Jara Raporto por 2011 estas prezentita – ĝi elstarigas kelkajn taskojn, kiujn la nova estraro devos solvi. Nunmomente, la membro-administrado estas plenumata de Herzberg. MG raportis la ĝisnunan iradon de la ekzameno-rikolto ĉe la sistemo UEA/ILEI.
7. La financa kalkulo pri 2011, kune kun spezaro, bilanco, stato de fondaĵoj kaj la revizora raporto → unuanime akceptita
8. Estrara raporto kaj senŝarĝigo de la nuna estraro → unuanime akceptita

===== kafo-paŭzo =====

9. La prezidanto skizas mallonge la elekto-proceduron, kaj transdonas la prezidadon al la prezidanto de la elekto-komisiono, Aurora Bute (AB)

La elekto-komisiono informas:

- * el 30 voĉoj (16 komitatanojn kaj 14 anstataŭigajn voĉojn), simpla plimulta voĉnombro estas 16 voĉoj.
- * el 29 voĉoj (30 minus koncernato), du triona voĉnombro estas 20 voĉoj.
- * el eksaj estraranoj 3 personoj (Stefan MacGill, Zsófia Kóródy, Radojica Petroviĉ) rekandidatiĝis kaj 6 novaj personoj kandidatiĝis.
- * SM forte subtenis la taskadon de sekretario al Radojica Petroviĉ kaj MG subtenis la rekandidatiĝon de Zsófia Kóródy.

La rezulto de la voĉdono de rekandidatiĝo de nunaj estraranoj, kiuj jam servis du aŭ pli da mandatoj:

Radojica Petroviĉ: por 27, sindeteno 3

Zsófia Kóródy: por 28, sindeteno 2

Nombro de elektotaj estraranoj. La elekto-komisiono proponas 8, kaj post aŭskulto de la resumoj de la kandidatoj, venas propono por 9: Okazas skriba voĉdono. Por naŭkapa estraro estas 21 voĉoj kaj por okkapa estas por 9, tial naŭkapa estrara teamo estas decidita.

Jen estas la rezulto de la voĉdonado:

Prezidanto. Stefan MacGill por 29 / sindeteno 1

Sekretario Radojica Petroviĉ por 27 / sindetenoj 3

Estrarano pri Financoj: Vilĉjo Harris por 29 / sindeteno 1

Gong Xiaofeng (Arko), Ĉinio, por 25, sindeteno 1

Bharat Kumar Ghimire, Nepalo, por 20, sindetenoj 6

Enikő Zengő Sereghy, Hungario, por 23, kontraŭ 2, sindeteno 1

Magdalena Feifiĉova (Fejfi), Slovakio, por 22, kontraŭ 1, sindeteno 1

Penny Vos, Aŭstralio, por 26.

Zsófia Kóródy, Germanio, por 24, sindetenoj 2

Ĉiu kandidato estas elektita kiel estrarano de ILEI.

La prezidanto esprimas grandan dankon al la malnovaj estraranoj, al la elekto-komisiono pro la glata prizorgo de la nesenkomplica elekto-proceduro, kaj bonvenigas la novajn estraranojn, pledante por harmonia kaj kolegeca kunlaboro.

La Komitata kunsido estas fermita kun peto al ĉiu komitatano ĉeesti ne nur la trian kunsidon jaŭde, sed ankaŭ la foruman diskuton pri la estonta agado.

